

La Interliga Popolo

Ekde la komenco la Sinjoro faris interligojn kun siaj infanoj sur la tero. Kiam lia popolo faras promesojn aŭ interligojn kun la Sinjoro, ili tiam scias kion Li atendas de ili kaj kiajn benojn ili mem povas atendi de Li. Kiam popolo faras interligojn, ili kapablas fariĝi konsiderinde virtemaj por efektiviĝi Lian laboron sur la tero. La grupo de popolo, kiu interligas kun la Sinjoro kaj kun kiu la Sinjoro mem faras interligon estas nomita "la interliga popolo de la Sinjoro." Membroj de la Eklezio estas parto de la interliga popolo de la Sinjoro.

"Kaj la Eternulo promesis al vi hodiaŭ, ke vi estos al Li popolo propra, kiel Li diris al vi, se vi observos ĉiujn Liajn ordonojn." (Readmono 26:18)

En kio konsistas interligo?

Tra la evangelio interligo signifas sanktan interligon aŭ reciprokan promeson inter Dio kaj persono aŭ grupo da homoj. Entreprenante interligon, Dio oferas benon interŝanĝe por obeo al specifaj ordonoj. Li fiksas la kondiĉojn de siaj interligoj kaj rivelacias ĉi tiujn kondiĉojn al siaj profetoj sur la tero. Se ni elektas esti obeemaj al tiuj ĉi kondiĉoj de la interligo, ni tiam ricevas la promesitan benon. Se oni elektas esti malobeemaj, Dio tiam detenas la benon kaj en iuj kazoj donas punon.

Ekzemple, aliĝante al la Eklezio, ni faras multajn interligojn kun Dio. Ni interligas kun la Savinto je bapto, prenante sur nin Lian nomon. Li promesas, ke "Ĉiuj el tiuj, kiuj estas baptitaj en mia nomo, kiu estas Jesuo Kristo, kaj eltenos ĝis la fino, estos savitaj" (Doktrino kaj Interligoj (DI) 18:22). Ni interligas kun La Sinjoro kiam ni partoprenas la sakramenton. Ni promesas rememori Lin kaj esti obeemaj al liaj ordonoj. Ni ricevas, laŭvice, promeson, ke la Sankta Spirito estos kun ni (DI 20:77-79). Kiel membroj de la Eklezio ni same interligas esti obeemaj al la leĝo de ĉasteco, observi la sabatan tagon (dimanĉo) kiel sanktan tagon kaj esti honestaj. Kiam ni eniras la interligon de eterna geedziĝo, ni faras aliajn sanktajn promesojn kaj ricevas, laŭvice promeson esti ekzaltataj pro nia fidela obeemo (DI 132:47).

Dio mem same faris specialajn interligojn kun apartaj personoj aŭ grupoj. Li faris specialajn interligojn kun Adamo, Ĥanoĥ, Noa, la Izraelidoj kaj Levi. Li faris specialajn interligojn kun Abraham kaj lia idaro, kiu rilatas al membroj de la Eklezio hodiaŭ.

La interligo de Dio kun Abraham kaj lia idaro

Abraham, unu el la profetoj de la Malnova Testamento, estis tre virtema viro. Li rifuzis adori la idolojn de sia patro. Li sekvis ĉiujn ordonojn de la Sinjoro. Sekve de lia virtemo la Sinjoro faris interligon kun li kaj lia idaro. Parto de tiu ĉi interligo rilatas al la vivoj de la Sanktuloj de la Lastaj Tagoj hodiaŭ. La Sinjoro promesis al Abraham, ke li havos sennombran idaron. Li promesis, ke ĉiuj el ili rajtos ricevi la evangelion, la benojn de la

pastreco kaj ĉiujn el la ordinoj de ekzalto. Tiuj posteuloj, per la povo de la pastreco, transdonos la evangelion al ĉiuj nacioj. Per ili ĉiuj familoj de la tero estos benataj. Dio promesis, laŭvice, de se ili estos virtemaj, li establos sian interligon kun ĉiuj generacioj de la infanoj de Abraham. "Jen estas mia interligo kun vi: vi estos patro de multe da popoloj. Kaj via nomo ne estos plu Abram, sed via nomo estas Abraham, ĉar Mi faris vin patro de multe da popoloj. Kaj Mi fruktigos vin tre multe, kaj reĝoj devenos de vi. Kaj mi starigos Mian interligon inter Mi and vi kaj via idaro post vi en iliaj generacioj, eternan interligon, ke Mi estos Dio por vi kaj por via idaro post vi. Kaj Mi donos al vi kaj al via idaro post vi la landon, en kiu vi loĝas kiel fremdulo, la tutan landon Kanaan, por eterna posedaĵo, kaj Mi estos Dio por ili." (Genezo 17:4-8).

Membroj de la Eklezio estas interliga popolo

La idaro de Abraham ne estas la sola popolo, kiun Dio nomas sia interliga popolo. Parolante al Abraham, Dio diris: "Ĉiuj, kiuj ricevas tiun Evangelion, estos nomitaj laŭ via nomo kaj estos konsiderataj kiel via idaro, kaj leviĝos kaj benos vin kiel sian patron." (Abraham 2:10). Tiel, de grupoj da homoj estas inkluzivitaj en la mirakla interligo farita kun Abraham. Tiuj, kiuj estas la virtemaj idaroj kaj tiuj, kiuj estas adoptitaj al lia idaro akceptinte kaj vivigante la evangelion de Jesuo Kristo. Kiam ni estas baptitaj en la Eklezion, ni estas adoptitaj al la familio de Abraham kaj partoprenas la interligon, kiun la Sinjoro faris kun Abraham, Isaak kaj Jakobo. "Ĉar vi ĉiuj per la fido estas filoj de Dio en Kristo Jesuo. Ĉar ĉiuj el vi, kiuj al Kristo baptiĝis surmetis al si Kriston. Ne estas ja Judo nek Greko, ne estas sklavo nek liberulo, ne estas ja vira kaj virina; ĉar vi ĉiuj estas unu en Kristo Jesuo. Se do vi apartenas al Kristo, vere vi estas la idaro de Abraham, kaj heredantoj laŭ la promeso." (Galatoj 3:26-29).

Estante obeemaj, ni heredas la benojn de tiu ĉi interligo. Ni rajtas ricevi helpon kaj gvidon de la Sankta Spirito. Ni rajtas posedi la pastrecon. Ni povas gajni eternan vivon en la ĉiela regno. Ne ekzistas pli grandaj benoj ol tiuj ĉi.

Tamen, kune kun tiuj benoj, kiujn ni ricevis kiel interliga popolo de la Sinjoro, ni havas grandajn respondecojn. La Sinjoro promesis al Abraham, ke per lia idaro la evangelio estos transdonita al la tuta tero. Ni plenumas nian respondecon per la plena misia programo de la Eklezio kaj per la misia laboro farita de la membroj. Tiu ĉi ŝanco proklami la evangelion al la tuta mondo apartenas nur al la Eklezio de la Sinjoro kaj al Lia interligaj popoloj.

Kiel la interliga popolo, ni devas sekvi la ordonojn de la Sinjoro. Kiam la popolo de la interligo rompas sian parton de la interligo per malobeo al la ordonoj, la interligo ne plu validas. La Sinjoro diris, "Mi la Sinjoro, estas ligata kiam vi faras tion, kion mi diras; sed kiam vi ne faras tion, kion mi diras, vi havas nenian promeson." (DI 82:10). Se ni estas malobeemaj al la ordonoj akceptinte la evangelion, ni stariĝos kondamnitaj antaŭ Dio (DI 132:4).

La nova kaj eterna interligo

La pleneco de la evangelio estas nomata de la Sinjoro "la nova kaj eterna interligo". Ĝi inkluzivas la interligojn faritajn ĉe bapto, dum la sakramento, en la templo, kaj en kiu ajn alia tempo. La Sinjoro nomas ĝin "eterna" ĉar ĝi estis ordinita de eterna Dio kaj ĉar tiu ĉi interligo neniam ŝanĝiĝos. Li donis la saman interligon al Adamo, Ĥanoĥ, Noa, Abraham kaj al aliaj profetoj. En tiu ĉi senco ĝi ne estas nova. Sed la Sinjoro nomas ĝin "nova" ĉar ĉiufoje, kiam la evangelio estas reestablita post kiam ĝi estas elprenita de la tero, ĝi estas nova por la popolo, kiu ĝin ricevas.

Kiam ni akceptas la novan kaj eternan interligon, ni konsentas penti, baptiĝi, ricevi la Sanktan Spiriton, ricevi la interligon de geedziĝo en la templo kaj vivi virteme ĝis la fino de nia vivo. Ni devas precize sekvi niajn interligojn. Se ni faras tion, nia Ĉiela Patro promesas al ni, ke ni ricevos ekzaltan en la ĉiela regno (DI 132:20-24).

Kiom benataj ni estas, esti lia interliga popolo. Al la fidelaj Sanktuloj la Sinjoro promesis "Kaj tiu, kiu ricevas mian Patron, ricevas la regnon de mia Patro; tial ĉio, kion mia Patro havas, estos al li donita." (DI 84:38). La grandeco de tiu ĉi promeso estas malfacile komprenebla por mortemuloj. La ordonoj, kiujn li donas, estas por nia profito kaj sen obo al ili ni neniam kapablos partopreni la benojn kaj belecojn de ĉielo kaj tero. Per la interligo, ni povas vivi en lia ĉeesto kaj partopreni lian amon, korfavoron, povon, bonecon, gradecon, konon, saĝon, gloron kaj regnon.

(Tiu ĉiu artikolo estas tradukitaj el Gospel Principles. Copyright La Eklezio de Jesuo de la Sanktuloj de la Lastaj Tagoj. Uzataj kun permeso.)